

# KATEDRA FONDUSO

Karaj membroj de Esperanto Nederland, karaj esperantistoj, karaj ĉiuj!

Jam de longe ekzistas la Katedra Fonduso por havigi al la katedra profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto ekstrajn rimedojn por Esperanto-iniciatoj kiuj helpas al la landa Esperanto-movado en Nederlando. Vidu informon pri la katedro en Vikipedio

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Katedro\\_Interlingvistiko\\_kaj\\_Esperanto](https://eo.wikipedia.org/wiki/Katedro_Interlingvistiko_kaj_Esperanto).

La Amsterdama katedro estas unikaĵo en la mondo: nenie ordinara profesoro nomumitas pro Esperanto, kaj krome temas pri unu el la plej prestiĝaj universitatoj de la mondo (la tiel nomata "top 100 club").

Longe ni ne atentigis pri ĝia ekzisto. Sed lastatempe la altigo de la garantia sumo postulata de la Universitato de Amsterdamo por specialaj profesorecoj kreskis tiom, ke kaj UEA, kiu responsas pri la katedro, kaj nia landa asocio devas buĝeti po 10 000 eŭrojn jare. Kaj kvankam ne ĉiam la tuta sumo estas bezonata, tamen niaj financaj rimedoj en la lastaj jaroj tiel reduktiĝis, ke ni povus elteni nur maksimume sep-ok jarojn laŭ la nuna elspeza nivelo.

Kompreneble la estraro serĉas ankaŭ eksterajn fontojn. Sed pro simila monmanko en multaj bonfaraj asocioj ni ne povas esti certaj pri sukceso. La decidon ĉu ni denove ligu nin por kvin jaroj, ni devos fronti jam en la sekva jaro 2018 por la periodo 2019-2024.

Ni do dependos grandparte de libervolaj pagoj, t.e. donacoj. Ĉar nia asocio havas tiel nomatan ANBI-statuson, eblas ĉe la imposta deklaro kalkuli cent-procente la donacosumon, per 5-jara kontrakto. Modelon vi trovas en la lasta Fenikso. Ankaŭ vi mem povas rigardi la formularon kaj detalojn ĉe:

[https://www.belastingdienst.nl/wps/wcm/connect/bldcontentnl/themaoverstijgend/programmas\\_en\\_formulieren/overeenkomst\\_periodieke\\_giften](https://www.belastingdienst.nl/wps/wcm/connect/bldcontentnl/themaoverstijgend/programmas_en_formulieren/overeenkomst_periodieke_giften).

Tamen se vi ankoraŭ havos demandojn ne hezitu demandi la kasistinon Loes Demmendaal: Duikerlaan 160, 2903 AC Capelle aan de IJssel. [kasisto@esperanto-nederland.nl](mailto:kasisto@esperanto-nederland.nl) - Tel: 010 – 2133320.

Se ĉiuj kiuj alte taksas la ekziston de la katedro kaj la laboron de nia profesoro, kontribuos eĉ per relative malgranda donaco, ni devas povi eviti ke tiel grava atingo, longe preparita kaj unika por nia lando kaj granda parto de Eŭropo, definitive perdiĝu. Reakiri tian postenon iam estontece estus iluzio. Multaj gutoj plenigu la vazon.

Esperante ke ankaŭ vi konscias pri la danĝero, kaj dezirante ke ni povu komune subteni la katedron, ni anticipe dankas al vi.

**La estraro de Esperanto Nederland**

**Augŭsto 2017**